Det här är ingen komplett lista på alla som arbetar i EsperantoCentro, nej långtifrån. Det är omöjligt för en utomstående att snabbt sätta sig in i all verksamhet som försiggår här. Jag vill framhålla att det är beundransvärt att så många stockholmsesperantister offrar en stor del av sin fritid för arbetet i EsperantoCentro. Trots detta finns det mycket som skulle kunna göras bättre om fler kunde ställa upp. Arkivering och utskickning av räkningar ligger till exempel långt efter helt enkelt på grund av tidsbrist. Du som bor i Stockholm med omnejd eller tillfälligt vistas där: kom ihåg att du alltid är hjärtligt välkommen till EsperantoCentro, vare sig du bara vill komma in ett slag och läsa några tidningar från hela världen, eller köpa en bok, eller rentav hjälpa till i arbetet. Det finns för det mesta mycket att göra även för en tillfällig gäst, och naturligtvis än mer för dem som kan tänka sig att ställa upp regelbundet.

Även de som inte har möjlighet att arbeta i EsperantoCentro kan underlätta arbetet för dem som arbetar där: Se till att du betalar in olika avgifter till rätt konto — kongressavgifter och medlemsavgifter för UEA till Esperantoförbundets specialkonto i Malmö, medlemsavgifter till din klubbkassör eller till förbundet i Stockholm om du är direktansluten. Klubbarna bör också anstränga sig litet mer på att skicka in rapporter och medlemsstatistik i god tid och på rätt blankett. Det skulle spara mycket arbete för medhjälparna på EsperantoCentro.

Till slut vill jag rekommendera alla som kommer till Stockholm att besöka EsperantoCentro för att få se lokalen med egna ögon och få tillfälle att få litet insyn i verksamheten.

Leif Gunnar Nordenstorm

## ESPERANTOCENTRO

Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34  
Öppet måndag — torsdag kl. 17 — 19.



# "De nia korespondanto en la ĉina ĉefurbo"



Sur la foto geinstruistoj de la 23-ana porinstruista kurso ĉe la Pekina Fremdlingva Instituto.

Dum kelkaj jaroj loĝis kaj studis en Svedio Geoffrey Sutton, kies nuna adreso estas Pekino, aŭ Beijing, kiel estas ĝia ĝusta nomo. Geoffrey Sutton estas tie kiel lingva konsilanto ĉe la redakcio de *El popola Ĉinio*.

Dum sia restado en Svedio Geoffrey Sutton estis membro de la redakcio de *La Espero*. Estas do tute nature, ke li pensas pri 'sia' antaŭa gazeto, kiam li loĝas en tia fora lando. Alvenas sufiĉe ofte leteroj kun tre interesaj detaloj pri la vivo de la ĉinoj kaj speciale pri la agado de la ĉinaj esperantistoj. Ni citu ĉiŝojn el longa letero, kiun li sendis la 4-an de aprilo kaj kiu enhavas eĉ pli da interesaĵoj ol kutime:

"Nun la vetero fariĝis varma, jam ĉirkaŭ 20 gradoj. Oni diras, ke en Pekino la vetero iras senpere de vintro al somero, kaj tiel ŝajne estas. Neniom da pluvo — kiel kutime. Mi vere ne komprenas, kiel la arboj povas ekburgoni tute sen pluvo dum monatoj! Kelkajn oni jam akvumas, sed tamen ne ĉiujn.

La salikoj la unuaj ekverdiĝis antaŭ eble dek tagoj, kaj nun aliaj arboj kaj arbustoj montras ŝosojn.

Restas ja la aĉa polvoproblemo! Nun mia fenestro estas

malfermita, sed kvankam estas feliĉe malmulte da vento, mi povas vidi fojajn polvo-nubetojn ekleviĝi de la lerneja ludkampo. Fakte la aero ĉi tie estas ĉiam plena de polvoj, tiel ke la mebloj eĉ unu tagon post purigo jam denove estas purigendaj. Se oni lasas la fenestron malfermita, nur dikiĝas la neevitebla polvotavolo! Mi sopiras al la julia musono. Tre kredeble ne pluvos inter nun kaj tiam!

Sinjoro Zhang Qicheng, la ĉefo, montris al mi antaŭ eble jam unu monato leteron al Ĉel de Ingemund Bengtsson kaj demandis, kiel oni prononcu lian nomon. Mi supozas, ke Ingemund Bengtsson ne mem skribis la leteron en esperanto? Laŭ mia kompreno li fariĝis aparte favora al esperanto. Iu(j) faris bonan laboron!

Eble vi ankoraŭ ne aŭdis, ke la ĉinaj aŭtoritatoj jam konsentis, ke la UK de 1986 povas okazi en Pekino. Mi ja tre ĝojis, kiam mi aŭdis tion, sed mi tuj replikis: sed ĉu multaj ĉinoj povos veni al ĝi? Ili tre malofte povas vojaĝi eĉ interne de Ĉinio kaj eĉ tio kostas al ili multe, se ne paroli pri loĝigo k.s. ... Kongreskotizo kostas trimonatan salajron jam! Kredeble UEA konsentos pri favora

malalta kotizo por la ĉinoj, sed restos la ĝenerala problemo. Mi timas, ke la UK ĉi tie iĝos turisma arango por la eksterlandanoj.

Mi antaŭ iom da tempo vizitis la presejon de *El popola Ĉinio*, kiu presis ankaŭ *Plenan analizon gramatikon*. Mi ankaŭ vizitis vesperan kurson de esperanto — konversacian kurson de homoj, kiuj lernis jam iom pli ol jaron. Plejparte estis gejunuloj. Kelkaj parolis jam sufiĉe bone, aliaj ne kuraĝis multon diri. Oni bedaŭrinde estis tro formala, kiel oni ofte emas ĉi tie. Kelkaj el la instruistoj el la porinstruista kurso vizitis min kelkfoje, kaj ĉiuj el ili venis al la traduk-oficejo de *El popola Ĉinio* unu posttagmezon por tie paroli esperanton kun la oficistoj kaj demandi, kiel ĉio funkcias. Ili jam estas tre entuziasmaj pri esperanto kaj aparte diligente lernas."

En pli posta letero, de la 3-a de majo, li skribas pri ĉinaj libroj en esperanto kaj pri eldonplanoj.

"La eldonado lastatempe iom stagnetis, sed pluraj libroj estas survoje. Nova malgranda ĉina-esperanta vortaro estas en presprova stadio. Ĝus aperis la romano de Eroŝenko "Rakontoj de velkinta folio" kaj "La paroladoj de Zamenhof", ambaŭ kun ĉina teksto fronte de la responda esperanta paĝo. "La familio" de Bakin estas jam finkorektita de mi (kaj multe, eventuale nesufiĉe, da inko mi verŝis). Kuŝas en mia tirkesto manuskripto pri la vidindaĵoj de Ĉinio, kiu bele taŭgos por la Pekina UK.

Eble plej grava kaj rekomendinda je la nuna momento estos la "Rakontoj pri Afanti": tre amuzaj, mallongaj popolarakontoj, ĉiuj legindaj; tre taŭga por komencantoj kaj kursoj, sed ankaŭ taŭga por ordinara lego. Mi ricevis la rajton libere reverki, kie mi deziras, kaj mi jam finfaris eble la kvaronon. La rasto ankoraŭ ne alvenis de la iom kruda ekstera tradukisto. Do por via libroklubo notu "La familio" kaj "Rakontoj pri Afanti".

Mi postulis bildseriojn kaj infanlibrojn, sed iel pretaj tradukoj ankoraŭ ne venis. Mi sugestis bonan, kolorbildan kaj kompetente tradukitan kuirlibron, kaj mi kredas, ke tio siatempe venos. Oni ankaŭ komencos kunlabori kun kompetentaj eksterlandanoj, kredeble pere de UEA."

Geoffrey Sutton



# Esperanto-vizito en la parlamentejo

Kal kaj Osborn sidis kaj rezonadis. "Ĉu ni iru al studgrupo pri la angla?" demandis Osborn.

"Ne, opiniis Kal. Ne utilas scipovi la anglan."

Guste tiam proksimiĝis anglo, kiu demandis: "Do you speak English?" Ili kapneis. La anglo daŭrigis: "Can you tell me the way to the station?" Ili reskuis la kapon kaj la anglo foriris.

"Jen pruvo, ke ne utilas scipovi la anglan", komentariis Osborn.

Tiun ĉi malnovan anekdoton memoris la prezidanto de la sveda parlamento Ingemund Bengtsson, kiam li interparolis kun dudekkvino da esperantistoj, kiuj vizitis lin en la parlamento en aprilo ĉijare. La klubo invitita estis tiu de Tyresö, sed al la Tyresöanoj aliĝis ankaŭ kelkaj membroj el Nynäshamn (i a la prezidanto de SEF Roland Lindblom) kaj el Stokholmo. Pluraj interesitoj devis resti hejme, ĉar ne eblis akcepti pli ol 25 vizitantojn.

La vizito havis kiel celon informi pri la laboro de la sveda parlamento kaj pli taŭgan ĉiĉeronon oni apenaŭ povas imagi al si. En la granda enirhalo Ingemund Bengtsson bonvenigis la vizitantojn per esperanta "Bonvenon al la sveda parla-

mento!", sed la pluan gvidadon tra la parlamento li prizorgis svedlingve.

La vizito komenciĝis en la parlamenta ĉambro, kie la parlamentanoj ĝuste tiam paŭzis kaj daŭrigis en la reprezenta salono de la parlamenta prezidanto, kie la vizitantojn bonvenigis tabloj kun kukoj kaj kafo, Ĉi tie Ingemund Bengtsson detale priskribis la laboron de la parlamentanoj kaj siajn taskojn en la parlamento, kaj la funkciadon de la sveda parlamenta sistemo, spicigante sian prezenton per oftaj anekdotoj. Parton de lia prezentado Franko Luin tradukis en esperanton. Por la okazo la klubo de Tyresö ankaŭ pretigis mallongan "parlamentan vortliston" sved-esperantan.

Sed la interparolo ne temis nur pri la sveda parlamento. Oni kompreneble ankaŭ parolis pri esperanto. Ingemund Bengtsson rakontis pri artikolo, kiun li antaŭ nelonge ricevis de tri anglaj sciencistoj.

"Ĝi argumentas por ke ĉiuj sciencaj studoj aperu kun resumo en esperanto" Ingemund Bengtsson diris, laŭ sonbendo registrita je la okazo de Jan Milld. "Kaj ili havis trafilan argumenton. Multaj diras, ke esperanton nur

malmultaj parolas. Vere, respondas unu el la sciencistoj, sed komence ankaŭ malmultaj havas telefonon. Oni povis nur telefoni al tiuj, kiuj havis ĝin. Nun ĉiuj havas telefonon kaj oni povas telefoni al ĉiuj. Tio estas tre bona komparo. Ĝin faris anglaj sciencistoj, kiuj mem vere interesiĝas pri esperanto. Unu el ili eĉ mem faras resumojn en esperanton. Ili konstatis, ke sciencistoj en la tuta mondo estas devigataj prezenti siajn stud esplorojn en la angla. Tio signifas ke tiuj, kiuj ne estas denaske angloj, devas dum dek jaroj de sia vivo studadi la anglan, dum la anglalingvanoj povas uzi tiun tempon por sia scienca laboro. Japanoj, kiuj neniam studis la anglan, verkas siajn stud esplorojn en la japana. La anglan ili ne povas legi kaj ili ne konas la esplorrezultojn faritajn de aliaj. Pro tio oni postulu resumojn en esperanto.

Tiu artikolo havis mem resumon en esperanto.

La komparon kun la telefono mi trovis fakte tre trafa."

La prezidanto de la parlamento ne povis dediĉi sian tutan vesperon al la esperantoklubo de Tyresö. Post iom pli ol horo li pludonis la taskon al la parlamentano Karl-Erik Svartberg, kiu plugvidis i a al la publika balkono de la parlamenta ĉambro, de kie oni povis aŭskulti (neinteresan) diskuton pri pajlo kiel energifonto.

Ankaŭ kun Svartberg estis ebleco preparoli esperanton, kun kiu li jam foje renkontiĝis, i a kiel observanto ĉe la sveda esperanto-kongreso en Kungälv en 1979. Li promesis distribui la antaŭan numeron de *La Espero*, tiu kiu temis pri esperanto en la lernejo, al ĉiuj membroj kaj anstataŭantoj de la parlamenta komisiono pri lernejoj. Tio dumtempe ankaŭ okazis jam.

Sed tio ne estis la solaj du parlamentanoj, kiuj sciis pri la vizito de la esperantistoj al la parlamentejo. Kiam Ingemund Bengtsson dum la tago antaŭ la vizito menciis ĝin al Olof Palme, tiu ĉi alvenis kun letero, kiun la sveda ambasadoro ĉe UN, Anders Thunborg, estis sendinta al li. La letero enhavis esperantan resumon de prelego, kiun Palme faris ĉe UN la pasintan aŭtunon [legu ĝin sur alia paĝo de ĉi tiu numero].

**Franko Luin**



La prezidanto de la sveda parlamento Ingemund Bengtsson kaj lia porokaza tradukanto Franko Luin. Ulla Luin fotis.



# Parolado pri paco de sveda politikisto

*La novjorka oficejo de UEA dissendas al esperantaj gazetoj resumojn de paroladoj faritaj en UN aŭ de dokumentoj de UN. Pri senarmigo ĝi dissendis resumon de parolado, kiun la antaŭa sveda ĉefministro Olof Palme faris.*

La semajnon de 24 — 30 de oktobro 1981 Unuiĝintaj Nacioj deklaris "Semajno de la senarmigo". Dum tiu semajno multaj manifestacioj favore al senarmigo okazis en la sidejo mem de UNO kaj ankaŭ en multaj aliaj lokoj de Novjorko kaj aliaj urboj en la mondo.

Inter la okazaĵoj en la novjorka sidejo de UNO eble la plej rimarkinda evento estis parolado de Olof Palme, eksĉefministro de Svedio kaj ĉefo de Sendependa Internacia Komisiono por Senarmigo, al ni konata pro sia favora sinteno al esperanto. El lia parolado ni prezentas ideojn iom mallongigitajn kaj citaĵojn.

Antaŭ ĉio sinjoro Palme atentigis, ke la postmilita timo de la atombomboj iom post iom malaperis, kaj ke la nuna homo konsideras la atoman armigon kaj eventualan atoman militon kiel ion neeviteblan, kvankam intertempe kelkaj ŝtatoj akumulis tiom da atomaj armiloj, ke ili povus plurfoje detrui la tutan homaron. La du superpotencoj amasigis kaj daŭrigas la amasigadon de pli kaj pli potencaj detruiloj, kvankam sciencistoj kaj aliaj konsilantoj klarigis al la gvidantoj de tiuj nacioj, ke amasigo de armiloj ne donas al tiuj nacioj pli grandan sekurecon, sed kontraŭe pligrandigas la malsekurecon de la mondo, do ankaŭ de ilia propra nacio.

Jam en la nuna stadio en nur kelkaj minutoj iu ajn el la superpotencoj kapablas superŝuti la alian per atombomboj. Tamen — kio estas plej maltrankviliga — kelkaj parolas pri ebla "venko" en tia milito. Eĉ pli maltrankviliga estas la penso de kelkaj politikistoj pri "limigita" nuklea milito.


Sed neniuj diras, kiu kapablas haltigi je certa punkto la kometitan nuklean detruon.

Fine, laŭ la diro de la sveda politikisto, la popoloj komencis reagi, ĉar ili konsciigis, ke eventuala atommilito, limigita aŭ ne, atingos ne nur tiujn, kiuj ĝin iniciatis, sed ĉiujn, ankaŭ neŭtralajn kaj nealiancistajn landojn. Li menciis la studojn de soveta d-ro Chazov kaj la usona d-ro Hiatt pri la efikoj de eksplodo de 20

estas antaŭ ĉio la alte kvalifikita laborforto, kapitalo kaj naturaj riĉaĵoj, nun uzataj por krei pli kaj pli efikajn armilojn kaj trejni pli kaj pli da soldatoj.

Senarmigo por evoluo eble ne estas nova ideo, sed ĝi povus esti nia sola vivoŝanco, ĉar aŭ ni daŭrigas la armigkonkuron aŭ ni konscie kun la sama energio turnas nin al ekonomia kaj socia evoluo. Ambaŭ ne eblas.

La humanisto-politikisto Olof Palme plue ekzamenas la bedaŭrindajn sekvojn de la eventuala malsukceso de SALT, komenco de interkonsento de la grandpotencoj pri limigo de nuklea armigo. En Eŭropo la popoloj komencas konsciigi, ke en eventuala nova konflikto denove ili estos oferataj, kvankam ili relati-



megatuna atombombo super Bostono. Ĝi postlasus 2 240 000 mortintojn, eĉ pli multe da vunditoj, blinduloj, malsanuloj, kiuj kuŝus senhelpaj, ĉar la kuracistaro samproportie pereus kaj estus vundita. La akvo kaj nutraĵoj estus venenigitaj. La ĝenerala situacio estus katastrofa, senespera.

La armilkonkuro, asertis Palme, malebligas la ĝeneralan evoluon, ĉar ĝi rekte konkuras kun la evoluoprogramo en la buĝeto de ĉiu lando. Krome la rezervoj necesaj por evoluo

ve bone interkompreniĝas kaj malamikeco inter ili preskaŭ ne ekzistas. Tian senton spegulas la grandaj porpacaj demonstracioj en diversaj eŭropaj ĉefurboj.

Fine li resumis la bazajn konceptojn de sekureco jene:

"Nacia sekureco ne povas esti atingita per kreado de internacia nesekureco, ĉar sekureco estas nedividebla respondeco de ĉiuj. Ĝi estas atingebla nur kune kun la supozita malamiko, kaj ne kontraŭ li. Sekureco estas serĉenda en kunlaboro, ne en rivaleco kaj arma supereco. Tio



estas imperativo de la nuklea epoko.

Ciuj nacioj havas rajton al armea defendo. Sed tridek kvin jaroj de armiga konkuro ankaŭ pruvis, ke armea forto sola ne sufiĉas kiel bazo por sekureco. Sekureco devus esti konsiderata el pli vasta perspektivo ol nur armea. Por individuoj, por nacioj kaj por la homaro sekureco havas ankaŭ ekonomian, socian kaj kulturalan aspektojn. Por individuo sufiĉaj nutraĵo, laboro, ekonomia ebleco kaj certa grado de partopreno en la komuna progreso signifas pli grandan sekurecon. Por nacioj bonfarto de ĝiaj civitanoj kaj la libereco strebi por naciaj celoj — kio estas la esenco de la sekureco de sendependeco — povas esti minacataj de kontraŭa ekonomia tendenco, same kiel de eksteraj armeaj minacoj. Tial la serĉo de komuna sekureco devas baziĝi ankaŭ sur komuna prospero.

Grava aspekto de nia laboro estas teni kontakton kun neregistaraj organizoj. La NRO-j estas inter la plej bonaj vojoj por atingi publikan opinion, por interesigi homojn pri ĉi tiuj esencaj decidoj por nia estonto. Kaj tio estas necesa pro pluraj kialoj. Ekvilibrita senarmigo povas esti atingita nur per intertraktado. Kaj por ke tiuj intertraktadoj estu sukcesaj, por igi la rezultojn akcepteblaj kaj akceptataj, la popolo devas ilin partopreni.

Albert Einstein iam avertis, kio okazus, se la popolo ne partoprenus, se la popolo ne reagus:

'La politika apatio de la homoj en paca tempo indikas, ke ili volonte lasos sin gvidi al la buĉejo poste. Ĉar hodiaŭ ili ne havas eĉ la kuraĝon doni sian subskribon por senarmigo, ili estos devigataj verŝi sian sangon morgaŭ.'

Tio ĉi estis intenco provoko flanke de tiu grandulo. Nun, fruntante la faktojn, mi estas konvinkita, ke la popolo reagos, ke la homoj postulos la haltigon de la armigkonkuro kiel sian rajton. Jam en 1959 prezidento Eisenhower asertis:

'Mi volas kredi, ke homoj en la estonto faros pli multe por antaŭenigi la pacon ol niaj registaroj. Vere, mi opinias, ke la homoj volas la pacon tiel forte, ke plej bone estas, ke la registaroj cedu al ili kaj havigu ĝin al ili.'

# JESONE

## Trevligt i ÖREBRO

Den 13 februari deltog jag i ett trevligt esperanto-arrangemang i Örebro. Vi var ett 30-tal elever från Kiruna i norr till Skåne i söder. Deltagarna placerades i olika grupper, t ex en ungdomsgrupp, en sånggrupp samt olika konversationsgrupper. Jag tillhörde en konversationsgrupp; vi var 6 stycken med Kerstin Rohdin som ledare.

Vi valde bl a ut ord ur Plena vortaro och pratade om dem, naturligtvis på esperanto. Det blev invecklade funderingar emellanåt. Likadant gjorde vi med ordspråk. Det blev också diskussion om hur vi kan sprida esperanto, t ex intressera folk i vänorter. I många utvecklingsländer är det ekonomiska svårigheter när man startar esperantoklubbar. Det fattas läroböcker och annat material. En svensk klubb kan "adoptera" en sådan och förutom hjälp med material brevväxla med dessa meningsfränder. Då blir detta samarbete givande för båda parter.

Någon från Örebro klarade under dagen med glans sin lägre examen. Vi åt en gemensam lunch och till kaffet på eftermiddagen serverades sketcher, poem och sång från sånggruppen.

Ann-Christine Krondahl

## Fler bidrag från Klubo Cent

Det är ett ansenligt bidrag till vår verksamhet som kommit in genom Klubo Cent under åren. Glädjande nog dyker det ofta upp nya namn i vår lista över dem som vill ge ett extra stöd i arbetet att sprida kännedom om esperanto. Här är nu en ny lista med gamla välkända och nya namn:

Alingsås Esperanto-Societo  
Sune W Ahlm, Vänersborg  
Borlänge Esperantoklubb  
Erik Brenander, Kvånum

Anna Ericson, Sundsvall  
Karl E Gustafsson, Bergvik  
Tore Gustavsson, Skövde  
Leif Holmlund, Skellefteå  
Hästveda Esperantoklubb  
Alice Johansson, Norrköping  
Nils Johansson, Norrköping  
Signild Johansson, Kalmar  
Tore Johansson, Kalmar  
Erik Carlén, Kumla  
Barbro Karlsson, Lysekil  
Edvin Karlsson, Borås  
Erik Lundevall, Borlänge  
Gustav Nygård, Göteborg  
Malte Smith, Kävlinge  
Sven Strandberg, Lund  
Jan Strömne, Malmö  
Erik Swärd, Malmö  
Hildur Södergren, Borlänge  
Hillevi Zackrisson, Linköping  
Thorsten Farm, Sundsvall  
Gävle Esperantoförening  
Ljungby Esperantoklubb  
Ivar Paulsson, Solna  
Herbert Rosendahl, Vänersborg  
Karl Erik Sterner, Göteborg  
John Wik, Kalmar

## Ordboksarbetet fortskrider

Den 15 mars har Oskar Svanteson inkodad det sista ordet i den nya svensk-esperantiska ordboken. I och med detta är den andra fasen på väg till en ny ordbok avslutad. Det arbetet som Oskar åtagit sig och fullföljt var inte lätt — därför är han värd mer än en enkel ros.

Mycket arbete återstår innan vi kan ha ordboken i våra händer, men man börjar nu skönja slutet av det hela.

## Suda distrikto en Helsingborg

La suda distrikto de SEF jarkunvenis en hotelo Savoy en Helsingborg la 28an de marto.

Laŭ la jarraporto okazis kursoj por komencantoj en ses urboj de la distrikto, daŭrigaj kursoj en sep, ekspozicioj en bibliotekoj kaj montrofenestroj en sep lokoj kaj en Skania fiouro. La pola aktorino Jadwiga Gibczyńska



faris tre sukcesajn prezentadojn en Malmö kaj Lund. La sveda radio dufoje sendis informan programon el Malmö. La dansveda esperantotago okazis la 6an de septembro kun vizito al apoteko Lejonet; Martin Säter rakontis pri sia vizito al Brazilo. En oktobro okazis en Hjälmövik tre valora konferenco por funkciuloj. En junio okazos proksime al Höör kurso por instruistoj kaj lernejoj.

La estraro estis reelektita: Olle Olsson, prezidanto, Lisbet Andreasson, sekretariino, Gertrud Lund, kasistino kaj Karin Strandberg, studgvidantino.

Post bongusta lunĉo okazis vigla diskuto pri la ekonomio de SEF. Karin Strandberg enkondukis la temon, kiu ricevis tri partojn: membrokotizoj; informamaterialo; dungo de oficisto.

Fine ni havis vivan gazeton kun belaj bildoj pri Norvegio de Asta Schaedel, pripremsinda geografia rebuso de Britta Lindeberg kaj prezentado de la birda vivo per foto-spertulo Malte Markheden.

#### Ceestinto

### Tiel mi komencis

Sufiĉe ofte okazas, ke esperantistoj rakontas, kiel ili ekinteresiĝis pri esperanto. Kaj ĉiu tia rakonto havas ion specialan. Unu tian rakonton ni peru al vi. Ĝi venas de Gustav Stenholm.

"Kiam mi estis juna Hermods-studento (ĉirkaŭ 1935) kaj penis ricevi la abiturientan ekzamenon laŭ la latina linio, studante perkoresponde hejme apud alia laboro, mia patrino iun tagon donis al mi malnovan lernolibron pri esperanto. Ĝi estis presita ĉirkaŭ 1905 kun tekstoj de Zamenhof kaj ankaŭ kun "La malnovaj vestoj de la imperiestro".

La nova lingvo min katenis, tiel ke mi neniam poste povis ĝin forgesi aŭ tute neglekti. Dum multaj jaroj mi kredis, ke mia voko al mi malpermesis interesiĝon pri esperanto, kaj ne helpis, ke la konata pentekostana fabrikestro Erik Carlén propagandis esperanton.

Mi tamen ne tute povis neglekti la lingvon. Kiam mi trovis esperantan tekston aŭ tekston pri esperanto, mi aŭde legis ilin.

De multaj jaroj mi jam legas Dian Regnon kaj kelkfoje ankaŭ la Biblion. Mi ankaŭ havas Biblian Revuon.

Por KELI-kunveno en septembro pasintjara mia esperanto-interesiĝo revekiĝis kaj elvokiĝis kvazaŭ eksplodo. Kial ne uzi tiun bonan lingvon?

Jam en Afriko mi trovis, ke ne sufiĉas koni la anglan, la francan, la svahilan ktp. Ankaŭ venas

rusoj kaj ĉinoj kun postuloj: "lernu niajn lingvojn". Tial mi komencis pensi: "La tempo de esperanto estas venonta." Kelkaj afrikaj instruistoj demandis al mi pri esperanto, sed mi estis malvigla kaj senkutima esperantogvidanto.

Eble mi nun, baldaŭ pensiulo, devus fari ion por la disvastigo de esperanto? Mi almenaŭ lernu ĝin ĝisfunde!"

## PERSONE

Mi havas nek hundon nek katon hejme. Al tiu, kiu demandas min, kial mi ne havas, kun relative granda domo kaj vasta ĝardeno ĉirkaŭ ĝi, mi respondas, ke unu hundo kaj unu kato sufiĉas jam en la familio — ĉar kiel hundo kaj kato rilatas ofte miaj du filinoj. Sed ne pri ili mi intencas skribi.

Antaŭ multaj jaroj mi fakte havis hundon. Pli ĝuste, mia edzo havis ĝin kaj "aledzigis" ĝin. Ĉar li jam tiam estis esperantisto, li donis al tiu sia fraŭlotempa hundo esperantistan nomon: Ludoviko. Praktike li nomis sian hundon Ludde, kaj tian nomon multaj svedaj hundoj havas. Sed al ĉiu esperantisto li klarigis la "veran" nomon de al hundo.



Tiu Ludde por 'Ludoviko' fariĝis tiel kutima, ke ni eĉ aplikis la nomon Ludde al la originalo, do kiam ni parolis pri Zamenhof mem, iel familiare, kvazaŭ li estus unu en la familio.

Estis tio en la tempo, kiam oni multe parolis pri la principaro de Frostavallen. Ĉu vi ne scias pri ĝi? Estas ia regularo pri informado pri esperanto; tio kion mi plej memoras pri ĝi estas, ke ĝi malkonsilis, prave, troigadon de esperantosimboloj. Tute praktike tio videbliĝis en la malgrandigo de la esperanta stelo, kiu ricevis minimuman formaton. Se oni tiutempe portis iom tro grandan stelon, oni riskis aŭdi insultajn vortojn de iuj. Nu, sed ankaŭ pri esperantaj steloj mi ne intencas skribi. Do reen al nia hundo Ludoviko.

Estis gasto en nia urbo ĝuste tiam tre eminenta esperantisto (ne, ne la plej eminenta!) kaj ni kompreneble, kiel relative nova esperanta paro estis prezentitaj al li, kun la aldono: "Kaj eĉ la hundo, kiun ili havas, havas esperantan nomon."

"A, kiel interesel!" la gasto tuj eldiris. "Kaj kian nomon?" atendante respondon kiel Fida, aŭ Bruna, aŭ kio povus esti hunda nomo.

"Ludoviko!" mi eksklamis senpripense kaj tuj malheliĝis la vizaĝo de la sinjoro.

"Ĉu vi serĉas?" li demandis severmiene; kaj ni ĉiuj ekatendis ekŝtormon, ĉar la sinjoro estis konata pro siaj subitaj ekflamiĝoj. La ŝtormo venis kaj ĝi enhavis ĉiujn paraĝrafojn de tiu fama principaro, duonon de la leteroj de diversaj profetoj esperantistaj kaj aliajn citaĵojn aplikeblajn al nia kazo. Kiel post ŝtormo ni iĝis tute malsekaj, sed de nia propra ŝvito.

Eta Mi



## Långsiktiga kongressplaner

Att planera och genomföra en internationell kongress är ett arbete på flera år. Därför finns det redan beslut om plats för kommande internationella esperanto-kongresser. I år äger kongressen rum i Antwerpen, Belgien, och arbetet är i full gång för nästa års kongress i Budapest, Ungern. 1984 tänker man bege sig till Vancouver i Kanada, 1985 till Augsburg i Västtyskland. För 1986 diskuterar man Peking, Kina, 1987, jubileumsåret, Warszawa i Polen och 1988 Australien.

Som syns är den tidigare trenden att hålla kongress helst i Västeuropa bruten; det är också ett gott tecken över den alltmer internationella utbredningen av esperanto.

## Jubileum år 1987

1987 kommer esperanto att bli 100 år. Inom Internationella Esperantoförbundet UEA har man redan tidigare diskuterat lämpliga åtgärder för att fira jubiléet, dels genom utgivning av lämpliga böcker, anordnande av konferenser mm. I år har arbetet intensifierats genom särskilda arbetskonferenser som håller på att utarbeta riktlinjerna för firandet. I planerna ingår bl a att använda 1983, Internationella kommunikationsåret, som upptakt inför en stegring av olika aktiviteter.

## Radio Peking skickar reporter

Radio Pekings esperantoredaktion kommer att ha en egen reporter vid årets internationella esperantokongress i Antwerpen. Radio Warszawa har under många år följt kongressarbetena och dagligen rapporterat från kongressorten. De övriga statio-

nerna har bara sporadiskt gjort det.

Man sätter beslutet att skicka en egen reporter till kongressen i samband med planer att anordna en internationell esperantokongress i Peking 1986. Kineserna har bara helt nyligen blivit representerade internationellt och saknar i stort sett kunskap om hur en esperantokongress fungerar.

## Symposium om sport

Mellan den 8 och 11 juli kommer ett internationellt symposium om sport att äga rum i Madrid, med kungen Juan Carlos som hedersordförande. Symposiet äger rum i samband med fotbolls-VM och kommer att behandla "idrott i det moderna samhället". Symposiet är på esperanto och har internationella esperantoförbundet UEA som medarrangör.

## Kurser á la Nordin

Ingemar Nordin är ordförande i Stockholmsklubben och dessutom ny i styrelsen för esperantoförbundet. Han har som många andra vid alla möjliga tidpunkter på året fått förfrågningar om kurser. Eftersom man ska smida medan järnet är varmt, har han kommit på idén att starta nybörjarkurser varje onsdag. Klubben har nämligen under onsdagar tillgång till lokaler i "Bryggghuset" i Stockholm, där en hel del människor kommer och går varje dag. I entréhallen finns ett anslag om att intresserade kan börja lära sig esperanto vilken vecka som helst.

Ingemar har hunnit ta hand om flera stycken under tiden sedan starten i januari, och med gott resultat.

## Tidskrift om planspråk

I Schweiz ha en ny tidskrift sett dagens ljus under namnet *Planlingvistiko*. Den kommer att behandla frågor kring planspråk (dit esperanto räknas) och vänder sig främst till språkvetare.

Vid UEAs Centro de Esploro kaj Dokumentado finns dessutom planer på att återuppliva den avsomnade tidskriften *Esperantologio*, tidigare utgiven i Danmark. Denna tidskrift skulle behandla enbart esperanto som språk. Även den skulle rikta sig till språkvetare.

## Om esperanto på engelska

Vid det vetenskapliga förlaget Mouton har dr Peter G Forster gett ut en studie om esperantorörelsen under titeln "The Esperanto Movement". Den kände amerikanske språkprofessorn Joshua A. Fishman har i sin recension av boken bedömt den "... inte bara unik, utan också välgjord, grundlig och stimulerande ... ett pionjärbete och välskriven. Detta är den första studien över världsrörelsen i allmänhet ..."

## Norge bjuder tillbaka

Den norsk-svenska träffen i Årjäng i fjol blev lyckad och det talades om en ny träff 1982. Nu har norska esperantoförbundet kommit med avisering om träff den 22 — 24 oktober. Det blir i trakten av Hamar, ca 15 mil norr om Oslo.

Programmet håller fortfarande att finslipas, men man vet att det blir kurser och diskussion, troligtvis kring ämnet kommunikation, nästa års FN-tema. La Espero återkommer med detaljer.